# FERVOJA ESPERANTISTO

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio

Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

Fondita 1952 | Numero 4 | Oktobro/Decembro 2005




Kongresszentrum „Esperanto" in Fulda — Foto: Fritz Lautenbach

# J. Gießner memorsemajno - plena sukceso

De la 10a ĝis la 14a de oktobro 2005 kunvenis ĉe ICH en Herzberg seminarianoj ne nur el Germanio sed ankaŭ el Danlando kaj Rumanio. Eniris bonvenigleteroj de GEFA-prezidanto Rolf Terjung kaj el Bulgario, Francio kaj Slovakio.

Nur skize pri Joachim Gießner: Li naskiĝis en la jaro 1913 kaj mortis en novembro 2003. Profesie li estis staciestro en Herzberg. Dum 52 jaroj li estis GEFA-prezidanto kaj dum pli ol 20 jaroj eĉ IFEF-prezidanto. Li estis elstara organiza talentulo, i. a. li fondis la Esperanto-Grupon en Herzberg, la Fervojistan Esperantistan Asocion en Rumanio, ktp. Senpaŭze li vojaĝis kaj organizis, redaktis nemalmultajn fakgazetojn, ellaboris lernolibron por turkoj, zorgis pri ampleksa fakterminologio, tradukis, eldonis librojn kaj estis elstara fakulo rilate al tradukado de kantoj el Germanio kaj aliaj landoj (infankantoj, maristaj kantoj, kristnaskokantoj, operaj kaj operetaj melodioj). Joachim Gießner eldonis diskojn, muzikkasedojn kaj kompaktdiskojn, ekz. kun kristnaskaj kantoj. Ofte li kunlaboris kun la konata Trio el Herzberg (Ulrich Mattke, Alfons Hoffmann kaj Walter Lange). Cetere ili ankaŭ muzikos el la repertuaro de Joachim Gießner dum la GEA-jubilea kongreso en Braunschweig dum Pentekoŝto 2006.

Dum la fakseminario la iamaj geamikoj, konatuloj rigardis kaj iom ordigis grandan kvanton da fotoj el lia privata kaj esperantista vivo, ordigis parton de la kantokolektaĵo. Nia celo estas konservi lin en la memoro per kolektado de ĉiuspecaj arkivmaterialoj (kongresaj ŝildoj, insignoj, artikoloj, ktp.) kaj eltrovi, esplori ĉiujn tradukitajn kantojn. Povas esti, ke entute ekzistas ĉ. 400 kantoj, kiujn Joachim Gießner tradukis. Tio estas/estos riĉa kolektaĵo por la Esperanto-movado. Ni dankas al Magdalina Feifiĉova pro la sindona helpo. Jen la bazaj informoj, kompreneble oni ankoraŭ povus rakonti multon pri Joachim Gießner, la elstara Esperanto-fakulo, kiu vivis kaj agadis dum ĉ. 40 jaroj en Herzberg am Harz.

Pluajn informojn kaj respondojn volonte donos:
via ICH-teamo en Herzberg.
Multajn salutojn!

**********

Esperanto-instruado, biblioteko, muzeo je via servo:
Interkultura Centro Herzberg
D-37412 Herzberg/Harz
Grubenhagenstr. 6, Tel: +49/(0)5521-5983
www.ic-herzberg.de

# La 49-a jarkunveno

Estis la 14-a de oktobro 2005, kiam la trajno veturis sur tiu 1927 konstruita fervoja digo, por atingi la plej nordan, germanan insulon Sylt. Tie, ĉe la rando de la belega, tipe frisa vilaĝo Rantum, la Germana Fervojista Esperanto-Asocio okazigis la jarkunvenon 2005. Nia renkontejo estis la bela BSW-hotelo „Alt Rantum". Tridek-naŭ partoprenantoj kolektiĝis, inter ili gastoj el Belgio, Danio kaj Romanio, kiuj ĝis la 16-a de oktobro ĝuis belegan, aŭtunan veteron kun agrabla temperaturo.

Unue iom pri la BSW-hotelo „Alt Rantum". Tiu hotelo, situante meze en la dunoj kun mallonga vojo al la plaĝo, estas vere rekomendinda hotelo por ferii, ankaŭ kun la tuta familio. Vi povas taksi ĝin kiel tri- kvarstela hotelo. Matene kaj vespere atendis nin riĉenhavan kaj bongustan bufedon. Nur la legomon la kuiristo kuiris laŭ moderna metodo per la „kapo" kaj ne per la „ventro".

Kiam la gastoj posttagmeze en la unua tago jam promenadis, por la BSW-komisiitoj tui komencis laborkunsido, jam antaŭ la vespermanĝo,. Sed antaŭe akceptis nin la hotelo per bongusta „frisotorto" kaj kafo. En la tradicia „konatiĝvespero" prezentis insulanino, s-ino Astrid Hanke, lumbildprelegon en Esperanto pri Sylt.

Venontan tagon, la 15-an de oktobro, la gastoj denove ĝuis la belan veteron. Ili veturis al Westerland, kie atendis urbgvidantino s-ino. Silke von Bremen, por montri kaj klarigi lokajn vidindaĵojn. Sed prominentulojn, kiuj abundas sur la insulo, ili bedaŭrinde ne renkontis. Dum la sama tempo la komisiitoj sidis en konferencĉambro kaj pritraktis gravajn kaj ne tiom gravajn temojn de la tagordo. Posttagmeze la tuto ekskursis per aŭtobuso de unu fino de Sylt al la alia. Ni veturis tra vidindaj, tipe frisaj vilaĝoj kun belegaj domoj kun per kano kovritaj tegmentoj, vidis modernajn partojn en la ĉefloko Westerland kaj aliloke, ni preterpasis tiujn, per amofiloj briditajn dunojn kaj ankaŭ migrodunojn. Ĉar Sylt estas insulo, ne mankis mallonga ŝipveturo. La klarigoj survoje estis bedaŭrinde germanaj, ĉar la ekskursoj okazis per publikaj aŭtobusoj.

Vespere estis la tradicia „dancvespero": Unue dancis la „Friesische Volklore Tanzgruppe Sylt". Ties gvidantino klarigis al la spektantoj la signifon de la solaj kostumpartoj de la dancantoj kaj provis instrui nin eĉ la frisan lingvon. Post tiu, iom longa spektaklo, ni mem dancis, instigitaj per bela musiko. La vespero tro rapide finiĝis.

En la ekveturtago multaj partoprenintoj jam matene hejmenveturis pro longaj vojoj hejmen. La restantoj vidis tre interesan (eble iom longan) filmon pri fervojo: „La vojo de la relo, 1835 – 2000". En tiu filmo parolis eĉ nia neforgesebla prezidanto Joachim Gießner. Tiuj adiaŭaj horoj estis eble ne sufiĉe „festaj". Unu kaŭzon vi certe povas vidi en la tre norda situo de la jarkunvena loko. Pro tio multaj partoprenintoj, kion mi jam skribis, devis frue hejmenveturi kaj ne plu povis partopreni en la lastaj horoj.

Entute nia 49-a jarkunveno tre bone kaj harmonie pasis. Ĉio okazis kontente. La partoprenintoj travivis belajn, ne forgeseblajn tagojn.

Rolf Terjung, GEFA-prezidanto

# Kongresszentrum Esperanto in Fulda
## - aus der Sicht zweier Eisenbahner-Esperantisten

**1. Walter Ullmann / Friedberg (Hess)**

1967 war ich bei der DB in der Fka Friedberg beschäftigt. Ich hatte schon ab und an von Esperanto im „Sozialblatt" gelesen und war interessiert, es einmal zu hören, d.h. zu erleben. Dann las ich vom Internationalen Eisenbahner-Esperanto-Kongress in Fulda und beschloss, mir das anzuschauen. Ich hatte an dem Mittwoch der Kongresswoche, d.h. am 7. Mai 1967, einen freien Tag und benutzte die Gelegenheit, nach Fulda zu fahren. Ich erinnere mich, dass ich nach Ankunft am Vormittag eine Esperantofahne vor dem Bahnhof sah und auch den Weg zum kongresejo, der Orangerie, fand. Dort jedoch war gähnende Leere, denn es war – was ich nicht wissen konnte – der Ausflugstag. Die meisten der Teilnehmer waren am frühen Morgen mit dem Sonderzug nach Rothenburg ob der Tauber gefahren. Ich habe mir dann noch die Miniatur-Eisenbahn angeschaut, ging im Bahnhof in die Kantine zum Essen und fuhr um 14 Uhr wieder nach Hause. Da habe ich die Sache „Esperanto" wieder gelassen bis 1976, als ich einen Anfängerkurs für Esperanto bei der Eisenbahnfachschule in Frankfurt (M) besuchte.

Von der Einweihung der Esperanto-Straße in Fulda habe ich dann ebenfalls aus dem Sozialblatt erfahren und mir die Straße später gelegentlich eines Besuches in Fulda auch angeschaut. Im März 2004 anlässlich der Vorstandssitzung von GEFA in Fulda, an der ich als Kassenprüfer teilnahm, habe ich die Baustelle des neuen Kongresszentrums besichtigt, im März 2005 – gleicher Anlass der Anwesenheit in Fulda – fehlte mir dazu die Zeit. Dann las ich im September dieses Jahres von der bevorstehenden Eröffnung und mittlerweile in anderen Zeitungsartikeln von der erfolgten Einweihung des Kongresszentrums und des Hotels mit Schwimmbad. Dem DEB habe ich vorgeschlagen, mit dem Hotel zu vereinbaren, dass dort immer Prospekte an der Rezeption ausliegen, für den Fall, dass jemand nach Esperanto fragt.

Meinen vielen Esperanto-Briefpartnern habe ich von der Errichtung des Hotels berichtet bzw. werde es noch tun. Ich hoffe, dass die Namensgebung des Kongresszentrums, die meiner Meinung nach zweifellos in der damaligen Benennung der Esperanto-Straße begründet ist, unsere Sache stärker in das Bewusstsein der Öffentlichkeit treten lässt. Selbstverständlich habe ich bereits einen Besuch in diesem Hotel, z. B. zum Kaffeetrinken dort, ins Auge gefasst.

**2. Fritz Lautenbach / Fulda**

1967 war ich Vorsitzender der damaligen Eisenbahner-Esperanto-Gruppe in Fulda. Ferner war ich im LKK des IFK zuständig für „ekskursoj/vizitoj". Im Vorfeld des Kongresses hatten wir (=GEFA) beim Magistrat der Stadt Fulda vorgefühlt und die Benennung einer Straße nach Esperanto während des Kongresses angeregt. (Das Gleiche geschah auch in Hilders/Rhön, einem der Ausflugsziele.) Nach einigen Schwierigkeiten wurde

dies so beschlossen und so kam es denn auch. Da die Esperanto-Straße eine Nebenstraße ist, war es lange Zeit ruhig damit. Erst als beim Umbau des Bahnhofs zum ICE-Knotenpunkt in der Unterführung Richtungsschilder angebracht wurden, trat die Esperanto-Straße wieder ins Bewusstsein, denn die Schilder sagten jedem, der lesen konnte, wo es zur Esperanto-Straße ging. Dies blieb so bis 2003, als die Beschilderung geändert wurde und die Hinweise verschwanden.

In den Anfangsjahren dieses Jahrhunderts wurde mehrfach in der Tagespresse über den bevorstehenden Bau des Kongresszentrums, dann über den erfolgten Baubeginn und zunehmend mit dem Baufortschritt auch über den Namen berichtet. Dies verfolgte ich interessiert bis zur Fertigstellung und Einweihung. Diese wurde am 24 September 2005 mit einer großen Gala gefeiert. Die kirchliche Weihe am Schluss der Gala nahmen der katholische Pfarrer Rauch und mein evangelischer Gemeindepfarrer Kohl vor. Dabei trug ich die Bibellesung in Esperanto und anschließend in Deutsch vor.



## Flugzeiten / Preise zum IFEF-Kongress in Schanghai/Peking

**Emirates**

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Hinflug | 05.05.08 | Frankfurt – Dubai | ab 15.15 Uhr | an 23.25 Uhr |
| | 06.05.06 | Dubai – Schanghai | ab 02.15 Uhr | an 14.55 Uhr |
| Rückflug | 17.05.06 | Peking – Dubai | ab 23.30 Uhr | an 04.20 Uhr |
| | 18.05.06 | Dubai – Frankfurt | ab 08.25 Uhr | an 13.15 Uhr |

Preis: 767,00 € pro Person, inkl. Steuern und Sicherheitgebühren

**Cathay Pacific**

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Hinflug | 05.05.06 | Frankfurt – Hongkong | ab 13.55 Uhr | an 07.55 Uhr |
| | 06.05.06 | Hongkong – Schanghai | ab 09.00 Uhr | an 11.25 Uhr |
| Rückflug | 17.05.06 | Peking – Hongkong | ab 17.15 Uhr | an 20.40 Uhr |
| | 17.05.06 | Hongkong – Frankfurt | ab 23.45 Uhr | an 06.00 Uhr |

Preis: 920 € pro Person, imkl. Steuern und Sicherheitsgebühren

**China Airlines**

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Hinflug | 05.05.06 | Frankfurt – Schanghai | ab 19.00 Uhr | an 11.25 Uhr |
| Rückflug | 18.05.06 | Peking – Frankfurt | ab 14.15 Uhr | an 18.20 Uhr |

Preis: 794 € pro Person, inkl. Steuern und Sicherheitsgebühren

Der Nachkongress in Peking endet am 17.05.06 nach dem Frühstück.

## Duisburg estiĝis fervojnoda stacio

Post kiam la fervojo anstataŭis la poŝtkaleŝojn kaj la ĉevalveturilojn, ĝi ĉiam pli gajnis signifon apud la vaporŝiptrafiko. „Pli grandajn avantaĝojn ol la ĝisnunaj trafikrimedoj (kanaloj, ŝipvetureblaj riveregoj kaj stratoj) ŝajnas oferti la fervojoj", skribis jam 1825 la fervoja-pioniro Friedrich Harkort. „Iu maŝino de ok ĉevalfortoj povus dum dek horoj transporti 1.000 funtocentojn da karbo de Duisburg al Arnheim. La barĝoj restas nur por ŝarĝi minimume ok tagojn en la haveno." Kaj por la estonteco Harkort deziras: „Venu ankaŭ en nia patrolando baldaŭ la tempo, kie la triumf-vagono de la industri-diligento estos jungata per fumantaj kolosoj."

1847 estis malfermata la plej grava fervoja linio inter Köln kaj Hamm trans Duisburg, la tiel nomata „Köln-Mindener". 1852 veturis en la pasaĝertrafiko sur tiu linio jam 70.352 pasaĝeroj de Duisburg kaj 64.435 pasaĝeroj al Duisburg – elmigrantoj kaj militistaro ne kunkalkulitaj kaj la vartrafiko ampleksis de Duisburg 896.211 funtocentoj kaj al Duisburg 1.151.550 funtocentoj. Kiam 1862 la „Bergisch-Märkische" fervojlinio ekspluatis sian linion Dortmund-Bochum-Essen-Duisburg, estiĝis Duisburg grava fervoja trafiknodpunkto kaj disponis nun pri la plej mallonga konekso kun la centro de la karbregiono.

Tiu, ek de 1841 inter Moers kaj Homberg trafikanta poŝtkaleŝo estis anstataŭata nur 1883 per la „Bergisch-Märkische fervojo". (Homberg kaj parto de Moers apartenas hodiaŭ al Duisburg kaj situas sur la maldekstra flanko de la Rejno.) Tiu nun trafikanta „tintfervojo" (Bimmelbahn), pro ĝia malrapida veturo de Homberganoj nomita „Schluff", dekoraciis sin per sia ĉiama malfruiĝo. („Schluff", libere tradukita signifas „piedŝova iro".) Kiam ekzemple en la haltejo „Möhlerdick" laboristoj venis el la laborejo por veturi per tiu „Schluff", rakontis iu okulatestanto, la konduktoro sciis precise, kiu ankoraŭ mankas. Tiam la trajno simple atendis ĝis la mankanta laboristo venis. Nur tiam la trajno daŭrigis sian peze irantan veturon.

La rapide evoluanta industrio faris necese konstrui apudan fervojlinion por senŝarĝigi tiun jam 1865 konstruitan linion Oberhausen-Sterkrade-Dinslaken-Wesel-Arnheim. Tiun apudan fervojlinion Oberhausen-Hamborn-Walsum-Wesel oni malfermis 1912. Sed ĝi ne havis signifon por pasaĝertrafiko.

Per la fondo de la „Ruhrort-Krefeld-Gladbacher Fervojentrepreno", al tiu Franz Haniel multe instigis, estis kreataj la kondiĉoj de fervojkonekso de Ruhrort al la malsdekstra bordo de la Rejno. Por la pramŝipa trafiko trans la Rejnon de Ruhrort al Homberg estis konstruitaj levoturon kaj fervojhavenon je ambaŭ flankoj de la riverego. 1856 la laboroj estis pretaj. Nun posedas Homberg fervojkonekson kun la vasta mondo.

Procedon kaj la rapidan produktaltiĝon de karbo kaj ŝtalo: Pro la eltrovo kaj disvastiĝo de la vapormaŝino multiĝis la disponeblaj mekanikaj fortoj. 1838 funkciis en la regiono de Duisburg 50 vapormaŝinoj, per kiuj oni povis elpumpi grandan kvanton da grunda akvo el karbminejoj. Nur per elminigo el grandaj malsuproj estis eble gajni grandan kvanton da karbo kaj ebligi migradon de la karbminejoj en la regionon de malsupra Rejno.

Per uzo de nun bone evoluita karbenergio evoluiĝis novaj produktmanieroj. 1848/49 sukcesis je la unua foje la fandadon de erco kun helpo de kokso. Sur la fundamento de karbtrovejoj en la hodiaŭa Ruhrregiono, rapide altiĝis la produkto de krudfero. Ne nur la fervojo mem estis granda uzanto de mineja kaj metalurgia produktaĵoj, sed ĝi ankaŭ tre vastigis la vendoradiuson de la energiportanto karbo. Kompare kun la ĉevaltransporto, malaltiĝis la frajtoprezoj al dekono, tiel ke la karbo anstataŭ ligno kiel hajtmaterialo je la unua fojo trovis superregionan markaton. Vapormaŝina trakcio kaj la uzo de karbenergio favoris la ekonomilokon Duisburg, kiu nun posedis bonajn transporteblecojn por karbo. (El „Kleine Geschichte der Stadt Duisburg", tradukita de Rolf Terjung)

## Spritaĵoj

En la nokto naskiĝis fratineto. – „La cikonio alportis fratineton por vi , Lars" - diris la patro al li matene. „Ĉu vi ne ŝatas ŝin rigardi?" „Hm!", diris Lars. „Mi jam ofte vidis malgrandajn infanojn. Ĉu mi ne povas rigardi la cikonion?"

* * *

„Mi ne timas tro miajn malsanojn, sed pli la eventualajn konsekvencojn." – „Jes, ankaŭ mi ankoraŭ ne pagis mian kuracistfakturon."

* * *

Petro instruis al sia fratino Esperanton. Kiam li parolis pri akuzativo, li diris, ke la erara uzo de akuzativo povas fari iun homon azeno. Li donis jenan ekzemplon:
„Vi Manjo rigardas min kiel azeno. En tiu okazo vi estas la azeno, ĉar vi rigardas min kiel azeno." „Nun Manjo, vi ripetu la ekzemplon, en kiu mi estas azeno." – „Vi rigardas min kiel azenon", diris Manjo. – „Sed Manjo, vi diris, ke mi rigardas vin kiel azenon, do, kiel mi rigardos azenon. Ja denove vi estas azeno, ĉar, vi erare uzis la akuzativon. Ĝis kiam vi ne lernas ĝin bone, vi restos azeno. Sed ankaŭ Manjo estas ruza. Ŝi diris al Petro: „Ĉu azenoj povas instrui Esperanton?" „Kompreneble ne", respondis Petro. – „Do, ankaŭ vi ne povas instrui Esperanton."



***Benitan Kristnaskon***
***kaj agrablajn festotagojn***
***al niaj gemembroj kaj ĉiuj niaj geamikoj.***

***Ni deziras por la jaro 2006***
***sanon, feliĉon kaj pacon en la mondo.***

**Hans-Werner Knötzsch *14.05.1920 - †29.09.2005**

Am 29. September verstarb unser langjähriges Mitglied Hans-Werner Knötzsch im Alter von 85 Jahren.
Hans-Werner Knötzsch war ein aktiver, beliebter Mitarbeiter der Esperantogruppe Schwelm und hat diese Gruppe, zusammen mit seiner vor einigen Jahren gestorbenen Frau, maßgeblich mitgeprägt. Er war auf vielen Esperantokongressen und -veranstaltungen ein gern gesehener Gast. Er hinterlässt eine fühlbare Lücke.
Wir trauern mit seiner Familie um ihn und werden ihn nie vergessen.

Rolf Terjung, GEFA-Präsident

# Dankesbrief der Familie Brandenburg

Uns bleibt nur **„Danke"** zu sagen,
für die vielen guten Worte, die tröstenden Umarmungen, die Anerkennung, die Willi genoss und an der wir teilhaben konnten.
Sein irdisches Dasein ist zu Ende, aber die Spuren, die er hinterlassen hat, finden sich vielerorts.
Danke auch für die Unterstützung der Elisabeth-Klünder-Stiftung, deren Anliegen auch im Sinne von Willi waren.
**Margret Brandenburg mit Kindern und Enkelkindern.**

Specialan dankon al ĉiuj niaj samlingvaj amikoj. Multaj el vi konas Willi jam jardekoj kaj scias, kiom li luktis por paco kaj interfratiĝo.

Tiel tekstis dankletero de Margret Brandenburg okaze de kondolencoj pri la morto de Willi Brandenburg.

Redaktfino por FE 1/2006 estos la 15.2.2006
Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt am Main
Schritfleitung/redakcio: Fritz Lautenbach, Abtstor 21, 36037 Fulda
Tel/Fax (06 61) 7 76 27, E-Mail: f-lautenbach@fulda-online.de
und Horst Jasmann, Otto-Nagel-Str. 10A, 12683 Berlin
Tel/Fax (0 30) 54 42 361

Das Foto **„BSW-Kulturpflanzen"** im Heft 3/2005 fotografierte und komponierte Alfred Söhlmann, BSW-Hauptbeauftragter Fotografie und Diapanorama.